



## Enhavo

### Ebloj por baldaŭa kleriĝo en Eŭropo

- Francio, Kulturcentro Greziljono
- Germanio, instruistoj en Herzberg-am-Harz
- Francio, kulturcentro Kvinpetalo
- Ĉeĥio, kursaro kun opera koncerto

Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

EKO 2019-13 sendita el Budapeŝto la 22an de septembro.

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol mil ricevantoj.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la al kroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

## Kleriĝo en la eŭropa aŭtuno

Abundas ebloj por kleriĝi, amuziĝi kaj pasigi tempon en Esperanta etoso.

### 1 Greziljono, Francio

Kie?: La fama franca Esperanto-kastelo Greziljono

Kiam?: de sabato 26a de oktobro ĝis dimanĉo 3a de novembro

Informoj en Eo: [gresillon.org/autune](http://gresillon.org/autune)

### DETALOJ:

- Anna Löwenstein, la verkinto de du historiaj libroj: *La Ŝtona Urbo* kaj *Morto de Artisto* instruos C-nivele pri literaturo, verkado, gramatikaj tiklaĵoj, krome prelegos.
- Murat Özdisdar el Istanbul instruos B1-B2-nivele, prelegos pri sia lando, kaj vojaĝoj.
- Xavier proponas meditado-seancojn.
- Fransoazo Noireau dancigos, kantigos, instruos violonon, promenigos, gvidos kvizon, parolos pri apoj, denaskismo, *Asperger*.
- Elisabeth Barbay zorgos pri infanoj: instruos per ludoj, ornamos la kastelon, preparos kostumojn por malnova festo, instruos magiajn ringojn.
- Thierry Charles preparos festan kukurban supon kaj dorlotos nin per vegetaraj kaj viandaj pladoj.
- Zdravka Bojĉeva el Luksemburgo kantigos la ĥoron (koruson) 'Interkant' dum la lastaj 4 tagoj.
- Jannick Huet organizos ĥor-koncerton kun 2 regionaj ĥoroj, sabaton 17h en la koncertejo de la urbo Baugé.
- Catherine Kremer prelegos pri la vivo en kasteloj mezepoke, kun infanoj ŝi konstruos mezepokan kastelon.
- Petra Severiano Laguna fotoprelegos pri la Kanariaj insuloj.
- Nathalie Dubrulle ĝardenumos por beligi la florbedojn

- René Jelenc laboros en la estonta ĉambro por rulseĝulo.
- Bert Schumann bonvenigos vin kaj respondecos pri la programo.

Greziljono esploras la eblojn revivigi la novjarajn aranĝojn.

### ③ Herzberg-am-Harz, Germanio



Kio: Torpedo 14 – kleriga semajno de AGEI – la germana sekcio de ILEI

Kie?: La Esperanto-urbo Herzberg

Kiam?: de la 2a ĝis la 6a de oktobro

Informoj: <http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=28269339>

Bv. eluzi la bonan eblecon por spertiĝo, faka lernado, spertinterŝanĝo, diskutado.

Bv. aliĝi, veni, partopreni. Ankaŭ parttempa partopreno eblas.

Zsafia Korody, AGEI-prezidanto

### ③ Bouresse, Francio

Kie?: La kultur-centro Kvinpetalo

Kiam?: de la 21a ĝis la 25a de oktobro ĝis dimanĉo la 3a de novembro

Akceptejo kaj poŝta adreso: 4 rue du Bureau, FR-86410 BOURESSE

Retadreso : [informoj@kvinpetalo.org](mailto:informoj@kvinpetalo.org); Telefono : (+) 33 (0) 549 034 314

Retpaĝaro (pri restado, prezo, kaj aliaj teknikaj informoj): <http://www.kvinpetalo.org>

#### **DETALOJ:**

**Katalin Kováts, redaktoro de [edukado.net](http://edukado.net) kaj sperta trejnisto de Esperanto-instruistoj, gvidos 5-tagan seminarion pri pedagogio.**

La partoprenantoj detale analizos la lingvajn kapablojn, trastudos la plurcenteran ekzerco-kolekton de [edukado.net](http://edukado.net), mem kreos ekzercojn kaj solvos aliajn. Specialan atenton ricevos tiklaj gramatikaj problemoj (uzo de akuzativo, posedaj pronomoj, participoj kaj aliaj) kaj evoluigo de aŭdkompreno kaj parolkapabloj.



*Eble aspektas timige serioze, sed mi povas certigi, ke dum tiaj seminarioj en pasintaj jaroj estis grandioza etoso. Estos sendube same ĉi foje. Ne maltrafu la okazon ĝui ĝojigan lernadon!*

La seminario taŭgos kaj por lingvolernantoj kaj por instruantoj ekde la nivelo B1-B2.

## 4 Bartošovice, Ĉeĥio

Kio?: La 6-a Internacia Esperanto- Lernejo en kastelo Bartošovice

Kiam?: la 7-an de novembro ĝis la 10-a de novembro 2019. Proksima urbo: Šumperk.

Informoj troviĝas ĉi tie : <https://esperlerni.weebly.com/>

En la 8-a de novembro 2019 je la 19 horo okazos koncerto de la Nacia Teatro. Kantos Vanda Šipová - solistino de Nacia Teatro en Prago. Ŝi kantas ariojn el opero *Sternenhoch*. Por partoprenantoj de lernejo, la eniro estas senpaga , por aliaj interesatoj la bileto kostos 250,- CZK.

Tiu opero estas regule ludata sur scenejo de Nacia Teatro en Prago. Temas pri unua opero en la lingvo Esperanto ludata sur scenejo de profesia teatro (la Nacia Teatro estas elstara scenejo en Ĉeĥa Respubliko) .



La opero estis komponita de neesperantista komponisto Ivan Acher kaj en ĝi marto ĉi-jare gajnis la plej valoran premion de profesiaj teatraj kritikistoj de Ĉeĥa Respubliko por muziko. Ĉiuj prezentadoj de la opero ĝis nun ( 8 prezentadoj) estis disvenditaj. La tekstojn en Esperanto brile faris Mirek Malovec - esperantisto el Brno .

Pavol Kascak - Verda Stacio

Vortoj: 600

=====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de 2018. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolinguloj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.